

ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2018-04-15 ĝis 2018-07-15.

Vivo de la Ligo

La estraro kunvenis per skajpo la 12-an de majo, la 9-an de junio kaj la 7-an de julio. Ne ĉiuj estraranoj povas partopreni, sed kutime la kvorumo estas atingita kaj decidoj povas okazi. La observanto de UEA Stefan MacGill ne ĉiam povas partopreni, ĉar UEA kunsidas je la sama tago kaj horo.

Januare okazis diskuto ene de la Estraro pri novaj Honoraj Membroj de ILEI por 2018. Profesoro Ronald Glossop kaj Profesoro Duncan Charters, ambaŭ el Usono, estos proponitaj al la Komitato por fina decido. Ne povas okazi surprizo por ili, ĉar la regularo postulas ilian antaŭan konsenton. Tiun konsenton la prezidanto jam ricevis.

La nova esplorkonkurso por gajni la Premion Mauro La Torre startis. Fine de februaro jam alvenis la unua laboraĵo por la konkurso – de nia itala samideanino Alessandra Madella. La ĵurio unuanime konsentis atribui al ŝi la Premion. Ŝia temo estas *Instruado de Esperanto en la Artkolegio en Kunming, Ĉinio, kiel etos-konstruado*. Ŝi ricevos la Premion okaze de la Tago de la Lernado en Lisbono.

Maje ĝis julie la Prezidantino sendis salutvortojn al la Universitato en Liaoning, kie malfermiĝas Esperanto-centro. Sekvis salutvortoj al la partoprenantoj de la Kantfestivalo en Vroclavo, Pollando, kie la revuo Juna Amiko estas patrono, al la partoprenantoj de la brazila Kongreso en Kuritibo, al tiuj de la trilanda Kongreso Germanio, Francio kaj Luksemburgio kaj fine al la fervojistoj okaze de la Kongreso de IFEF.

La reta voĉdonado ene de la Komitato pri akcepto de la buĝeto 2018 ne kontentige disvolviĝis. Pro tio la Komitato devos voĉdoni pri ĝi en Madrido.

Cele al bona disvolviĝo de la Komitat-kusido dum la ILEI-kongreso la Prezidantino Mireille Grosjean alvokis ĉiujn sekciojn kontroli kvanton da siaj komitatanoj. Tiu kontrolo havas celon atingi kvorumon dum la Komitatkunsido. Samecele ŝi plie alvokis al atentema delego de la komitatanaj voĉoj por ne alvenontaj Komitatanoj.

La Elekta Komisiono eklaboris jam en januaro por prepari la estrarajn elektojn, kiuj okazos en Madrido. La Komisiono konsistas el Aŭrora Bute el Rumanio, Zsafia Korody el Germanio kaj Rob Moerbeek el Nederlando.

Fine de aprilo Mireille Grosjean partoprenis la UEA-estrarkunsidon en Roterdamo. Tio ebligis profundan kontakton ne nur kun UEA, sed ankaŭ kun TEJO. Proksimaj kunlaboroj ekzistas.

La estraro de ILEI aprobis la nomumadon de kelkaj novaj sekciestroj.

Mireille Grosjean partoprenis la poliglota kunvenon en Bratislava, Slovakio, komence de junio. Ŝi oficiale reprezentis UEA-n, kiu sponsoras la eventon. Ŝi povis partopreni podian debaton kaj tie prezenti la lernhelpan efikon de Esperanto. Ŝi plie prelegis pri komparo inter du planlingvoj, Esperanto kaj Rumantsch Grischun, kreaĵo el tri grizonaj idiomoj en Svislando.

Kapabligo

EIT – Esperanto-Instruista Trejnado: evoluo de la programo RITE kaj MADRIDO.

La programo Reta Instruista Trejnado de Esperanto (RITE) kaj Madrido proponis 24 lokojn. En nun alproksimiĝanta ILEI-Kongreso partoprenos tri kandidatoj, kiuj regule kaj diligente plenumis la diversajn retajn taskojn en la studobjektoj Metodiko kaj Gramatiko. Kompare kun la 24 lokoj proponitaj, tio estas magra rezulto.

Kongresoj

La 51-a ILEI-kongreso en Madrido, Hispanio, 2018

Ĝi okazos kune kun la Hispana Kongreso. La Hispana Kongreso komenciĝos unue kaj du tagoj estos komunaj. Aliĝis entute proksimume 250 personoj, kio estas absoluta rekordo. La kunlaboro kun LKK en Madrido, la prezidanto de Hispana Esperanto Federacio Tonjo Del Barrio, la ILEI-estrarano pri kongresoj Radojica Petrovic kaj la prezidanto Mireille Grosjean funkcias glate. La programo estos aparte riĉa kaj varia, kun lingva festivalo, proksimume 25 fakaj kaj lertigaj prelegoj kaj du tagoj kun universitata simpozio.

ILEI-kongreso en 2019

Sciante, ke la Universala Kongreso de UEA okazos en Lahti, Finnlando, ILEI esploris kaj pripensis. Tamen preskaŭ certa eblo malaperis lastmomente. Pro tio Radojica Petrovic anoncis pretecon de la Fakultato pri teknikaj sciencoj en Ĉaĉak, Serbio, parto de la Universitato de Kragujevac. La kongreso temo estos *lernado en virtualaj komunumoj*. Tiu temo ebligos la konsideron de la Internacia Jaro de la Indiĝenaj Lingvoj lanĉita de Unuiĝintaj Nacioj kaj plenumita de UNESKO. Loko kaj temo estis aprobitaj de la estraro de ILEI la 7-an de julio.

Informado

La kutimaj kanaloj bone funkcias. Temas pri rekta sendo al la sekcioj, al la Komitatanoj, al la eo-gazetaro, radio-kaj televidkanaloj, al la retlisto e-ins, al la Facebook-paĝo *ILEI labortable*. La retejo www.ilei.info estas daŭre kaj akurate aktualigita danke al la diligenta laboro de Jozefo Nemeth el Hungario.

Servoj.

Servoj al niaj membroj estas la organizado de la Kongreso kaj la aperigo de nia organo IPR. Tio daŭre antaŭeniras. La revuo Juna Amiko aperas kvarfoje jare plenkolore kaj plezurigas siajn legantojn. La eldona laboro nuntempe konsistas el preparlaboroj por nova eldono de la Manlibro pri Instruado de Esperanto. Diskuto povis okazi kun la eldonejo Espero, konkrete kun ĝia direktoro Peter Balaz kaj Mireille Grosjean. Estas fakto, ke la lastan eldonon produktis Espero kaj ILEI kune.

Komisionoj, sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj

Daŭras kolektado de jarraportoj de sekcioj fare de la visceketarino Elena Nadikova. Pro la nova eŭropa regularo pri uzado de personaj donitaĵoj ILEI devis konsulti siajn sekciestrojn por obteni ilian konsenton pri aperigo de ilia nomo kaj adreso en la retejo www.ilei.info.

Preparlaboroj okazis kun geinstruistoj en Senegalo, tiel bone, ke la Komitato povos en Madrido decidi pri fondo de nova sekcio en tiu lando.

La nederlanda sekcio de ILEI sendis proponon al la prezidanto. Tiu propono aperas sur la tagordo de la Komitato de ILEI. Temas pri sugesto al UNESKO pri eldonado de verkoj de viktimaĵoj etnoj.

La respondeculo de la Komisiono pri regularoj Marija Belosevic komencis atentan trailegadon de diversaj dokumentoj de ILEI kaj sendis raporton al la komisionanoj kaj al la prezidanto. Temas pri tute adekvata sekvo de la evoluo de la Ligo.

Kunlaboro kun UEA

Brile evoluis la preparado al Tago de Lernado dum UK en Lisbono. La laboro estas en la manoj de Marija Belosevic, komisiito de ILEI pri agado de ILEI kadre de UK. Reciproka informado prizorgita de Stefan MacGill nome de UEA kaj Mireille Grosjean nome de ILEI bonege funkcias. AMO-seminario de UEA okazos kadre de la ILEI-kongreso en Madrido. En esploro estas disponigo de ISBN de UEA por la eldonaĵoj de ILEI. En aprilo en Roterdamo la estraro de UEA konsentis, ke Ralph Schmeits, oficisto de UEA en la Centra Oficejo, estu komisiito de ILEI por administraj nederlandlingvaj aferoj; fakto estas, ke la jura sidejo de ILEI estas en la CO de UEA en Roterdamo kaj okazas alveno de traktendaj bankaj aŭ urbaj dokumentoj en la nederlanda lingvo.

Kontaktoj kun aliaj enmovadaj institucioj

Laŭ la interkonsento kun LIBE, Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, ILEI preparas eblon eldoni IPR kaj JA en taŭga formato por la komputilaj legiloj de blinduloj.

Kontaktoj kun ekstermovadaj institucioj

Ekzistas interkonsento inter UEA-ILEI kaj Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio pri kunlaboro. La prezidantoj de UEA, ILEI kaj Zaozhuang-a Universitato subskribos ĝin dum UK en Lisbono.

Novembre la Prezidantino skribis leteron al la nova Ĝenerala direktorino de UNESCO s-ino Audrey Azoulay kun alvoko memori pri Esperanto kaj laŭeble apogi ĝin. Meze de februaro venis respondo de s-ino Audrey Azoulay, en kiu ŝi dankas Mireille Grosjean pro la subteno al Unesko kaj aktivado por Esperanto kiel lingvo, kiu “iras trans la homajn limojn, kunligiĝas kun la streboj de UNESKO en la kampo de interkultura alproksimiĝo”. La 18-an de majo Mireille Grosjean skribis al Sinjorino Azoulay kun mencio de la du juliaj kongresoj kaj peto pri salutvortoj. Sinjorino Azoulay sendis salutmesaĝon por la UK en Lisbono, kie ĝi estos laŭtlezata dum la malferma ceremonio. Mireille Grosjean tradukis ĝin al Esperanto.

La prezidanto eksciis pri interesaj eŭropaj programoj, kie ILEI povus partopreni. Ŝi iris al la svisa agentejo por tiaj programoj por informiĝi. Surbaze de tio la estraro diskutis kaj decidis ne komenci novan grandan laboron, kiam aliaj atendas pro manko je homfortoj.

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo ricevu elkorajn dankojn!

Prezidanto de ILEI:

Mireille Grosjean

La vic-sekretariino de ILEI:

Elena Nadikova

2018-07-15